



AGADO DE ESPERANTISTA GRUPO
ĈE MĚSTOB EN JIHLAVA
DECEMBRO 1961 N-ro 6

*FELIĈON KAŬ PACON
EN LA NOVA ĴARO*



Vintra ĉarmtago en Jihlava (MUDr F. Kubica)

Schůzky esperantského kroužku DK-ROH v Jihlavě konají se pravidelně každou středu od 18. do 22. hod. v Domě kultury ROH, Tolstého č. 2, 3. posch. v klubovně č. 133.

- L E T E R V E S P E R O de ĉiuj Esperantistoj en Jihlava okazos merkrede la 23-an de marto 1962. Salutkaroj aŭ leteroj petataj. Respondoj garantiataj.
- Nia adreso: Dům kultury ROH, esperantský kroužek, Tolstého 2, Jihlava.

Kunvenoj de Esperanto-grupo en Jihlava okazas ĉiu merkredo ek de la 18-a ĝis 22-a horo en Dům kultury ROH, Tolstého 2, en 3-a etaĵo klubejo 133.

50 JAROJ DE ESPERANTO — MĴVADO EN JIHLAVA

Esperantista grupo ĉe MĉstOB en Jihlava eldonis en decembro 1961 glumarkojn okaze de la 50-jara ekzisto de Esperanto en Jihlava. Ili samtempe memorigas la 5-an datrevenon de fondiĝo de Esperantista grupo ĉe MĉstOB en Jihlava. La glumarkoj estas presitaj en blokoj po 4 pecoj kun kadro en 4 diversaj

La 17-an de okt. 1961 estis fondita Esperanta grupo en libropresejo Grafia en Jihlava. 10 gelnantoj vizitadas E-kurson.

9 geesperantistoj el la personaro de psikiatria resanigejo fondis la 7-an de dec. 1961 Esperanto-grupon kiun gvidas sano Hlávka. Ili kunvenadas merkredo unufoje post 14 tagoj ek de la 17-a ĝis la 19-a horo.

koloroj. La tuta serio (4 kvarblokoj) kostas Kĉs 1,— aŭ unu respond kuponon. Mendebĵaj ĉe Frank Tichý, poŝtokoŝto 120, Jihlava. Pri ekzisto de Esperanto en nia urbo antaŭ 50 jaroj ni prezentos artikolon kun dokumentoj en venonta numero de AGADO.

Pripomináme všem našim odbĉrateĵum, že AGADO není ĉasopis, jak se mnozí domnívají, ale je neperiodický obĉzník jihlavských esperantistů.

Nyní po zrušení MĉstOB nalezli jihlavští esperantisté domov v nádhernĉm, novĉ vybudovanĉm Domĉ kultury ROH (viz ĉlánek na 4. str.). AGADO bude nadále vycházet za spolupráce esperantského kroužku Rudĉho koutku ZV ROH Grafia

n. p. Jihlava. Hlavním jeho úĉelem je jazykovĉ zdokonalování našich ĉlenů. Svĉm obsahem je tĉž vhodný jako kolektivní dopis a proto jej mnozí esperantisté odebírají ve více výtiscích a zasílají svĉm přátelům do zahraničí.

Do dnešního ĉísla pĉikládáme složenky na úhradu reŹijního pĉíspevku na vydávání. Nejmenší pĉíspevek pĉi odbĉru jednoho ĉísla je 8,— Kĉs za rok vĉetně poštovného. Pĉi odbĉru více výtisků najednou na jednu adresu, pĉiloŹíme složenku ke kaŹdĉ zásilce, takže odbĉrateĵe mohou uhradit pĉíspevek vŹdy za jednotlivĉ zásilky. V tom pĉípadĉ 1 Kĉs za jeden výtisk mimo poštovného.

Veškerou korespondenci řídte na adresu Esperantský kroužek ZV ROH Grafia n. p., k ruk. s. Tyraĉka, Srážná 17, Jihlava.

LA IV-a TUTŢTATA FESTIVALO DE VOĉ-KREADO EN JIHLAVA

Pasintjare jam kvaran fojon apartenis la fino de novembro en nia urbo al kantistoj. Jam kvaran fojon fariĝis Jihlava la scenejo de festivalo, dum kiu ekonis pere de elstaraj grupoj kaj solistoj novaj kantoj de ĉeĥaj komponistoj. Kaj ni rajtas esti fieraj pri brilega resonado, kiun havas niaj festivaloj en tuta lando. Ĉiujare kreskas la vicoj de eminentaj profesiaj kaj amatoraj kolektivoj, kiuj konsideras kiel honoron povi partopreni la festivalon. Ĉiujare venas al festivalo en Jihlava pli kaj pli da eminentaj gastoj. Nur rememoroj restis al komencaj malfacilaĵoj ĉe la akirado de elstaraj kolektivoj, ĉar ni sukcesis vekii intereson de decidaj agantoj, akiri daŭran favoron de la publiko. Jihlavaj festivaloj gajnis por si honoran lokon inter tradiciaj kultur-politikaj aranĝoj en nia lando. Ĉijare dum preparlaboroj plene subtenis Domon de Klerigo en Jihlava la Centro de Popola Artkrea-

do Praha kaj filioj de Asocio de ĉeĥoslovakaj Komponistoj el Praha kaj Brno. Ankaŭ jihlavaj amasorganizaĵoj, lernejoj, urba kaj distrikta naciaj komitatoj kaj precipe senĉese kreskanta nombro da aŭskultantoj kontribuas al sukceso de la festivalo.

Kaj kia estas la signifo de la Festivalo de Voĉ-kreado, sola tiaspeca festivalo en tuta respubliko? Ĝin montras eĉ fakto, ke ĉi-jare okazis dum festivalo ankaŭ tutŝtata seminario de ĥor-dirigentoj, kiun partoprenis membroj de centra konsulta organo por kantado, instruktoroj de ĥoroj de ĉiuj regionoj kaj metodikistoj de domoj de klerigo. La seminarion aranĝis la Centra Domo por Popola Artkreado, partoprenintoj vizitis ĉiujn festival-konzertojn, ili diskutis pri novaj komponaĵoj kaj en siaj prelegoj traktis la problemojn de nuntempa amasa kaj politika kanto kaj ĝia reprodukto. Per tio ĉio do helpas jihlavaj festivaloj al popola art-

kreado kaj eĉ al profesiaj ĥoroj. Ili instigas la grupojn al studado kaj interpretado de nuntempaj komponaĵoj, kiuj klare parolas pri aktualaj problemoj de la nuntempo. Kaj la komponistojn instigas niaj festivaloj komponi bonajn kaj teknike reprodukteblajn komponaĵojn eĉ por amatoraj grupoj. Al Jihlava do venadas ĥorestroj, komponistoj kaj fakaj kunlaborantoj por lerni, gajni spertojn kaj inspiron, kaj disvastigi novajn belajn kantojn en tuta nia patrujo.

Menciita festivalo entenis entute 5 koncertojn, kiujn partoprenis 10 kanĥoroj, Ŝtata filharmonio el Brno, kaj vico da konataj solistoj. Inter la ĥoroj estis ankaŭ tiuj, al kiuj aplaudis ĉijare rigardantaro eĉ eksterlande, en Anglujo, Francujo, Germanujo, Svisujo kaj aliaj landoj.

Robert Konopásek, direktoro de Domo de Klerigo. (Tradukis F. Tichý.)

Mluví m esperantsky

(Mi parolas Esperante)

5-a daŭrigo

255. Musite prokázati svou to-
tožnost. — Vi devas legi-
timi vin.

256. Máte občanskou legitima-
ci? — Ĉu vi havas civita-
nan legitimilon?

257. Mohu toto odeslat jako
tiskopis? — Ĉu mi povas
tion ĉi forsendi kiel pre-
sajon?

258. Jaký je příplatek na dopis
pro leteckou poštu? — Kia
estas alpagó (plipago) por
aerpoŝta letero?

259. Mohl byste mi vyměnit
stokorunu? Potřebuji drobné.
— Ĉu vi povas ŝanĝi
al mi centkronan bankbi-
leton? Mi bezonas mone-
rojn.

260. Kde se podávají balíčky?
— Kie oni akceptas la sen-
don de poŝtpakaĵoj?

261. Prosím, nejsou tu dopisy
na jméno A. B.? — Mi
petas, ĉu vi havas leterojn,
adresitajn al A. B.?

262. Máte nové známky s ob-
razkem Zamenhofa? — Ĉu
vi havas la novajn poŝt-
markojn kun portreto de
Zamenhof?

263. Chci poslat telegram se
zaplacenou odpovědí. — Mi
volas sendi telegramon kun
pagita respondo.

264. Jaká je sazba za deset
slov? — Kia estas la ta-
rifo por dek vortoj?

265. Možno telegrafovat espe-
rantsky? — Ĉu oni povas
telegrafi en Esperanto?

266. To je již dávno povoleno.
— Tio estas jam longe
permesita.

267. Kde je nejbližší telefonní
budka? — Kie estas la
plej proksima telefona ĉe-
lo?

268. V kavárnách a restaura-
cích jsou bezplatné telefo-
ny k použití. — En kafejoj
kaj restoracioj telefonejoj
estas senpago uzablaj.

269. Když se nikdo neozve, po-
věste sluchátko zase na
háček. — Se neniu sin
aŭdigos, rekroĉu la aŭskul-
tilon.

ZÁBAVY. — AMUZOJ.

270. Co se dnes hraje v opere?
— Kion oni ludas hodiaŭ
en la operdomo?

271. Dnes dávají Smetanovu
„Prodanou nevěstu“. —
Hodiaŭ oni ludas la Ven-
ditan fianĉinon de Smeta-
na.

272. Pojdme tam! Dostaneme
ještě lístek? — Ni iru
tien! Ĉu ni ricevos ankoraŭ
bileton?

273. V městě je několik zvláš-
tních prodejů. — En la
urbo estas kelke da spe-
cialaj biletvendejoj.

274. Kdy se otvírá hlavní po-
kladna? — Kiam oni mal-
fermos la ĉefan kason?

275. Dejte mi dva lístky vedle
sebe. — Donu al mi du
sidlokojn unu apud la alia
(najbarajn).

276. Kabáty si dáme do šatny.
— La surtutojn ni depo-
nos en la vestejo.

277. Už zvoní potřetí. — Oni
sonorigas jam la trian fo-
jon.

278. To dueto bylo mistrovsky
zpíváno. — La dueto estis
majstre kantata.

279. Toto drama jsem již ně-
kolikráte viděl. — Ĉi tiun
dramon mi jam kelkfoje
vidis.

280. Je přestávka dlouhá? Moh-
li bychom se trochu pro-
jít. — Ĉu la interakto es-
tas longa? Ni povus iom
promeni.

281. Pojdme na koncert do za-
hradní restaurace. — Ni
vizitu koncerton en ĝar-
dena restoracio.

282. Ten koncert je pořádán ve
prospěch dobročinného ú-
čelu. — Tiu koncerto estas
aranĝata por bonfara celo.

283. Jak se vám líbí hlas té
pěvkyně? — Kiel plaĉas al
vi voĉo de tiu Rantistino?

284. Je snesitelný, nijak zvláš-
tní. — Ĝi estas tolerebla,
tute ne eksterordinara.

285. Slyšíte? Hrají naši espe-
rantskou hymnu. — Ĉu vi
aŭdas? Oni ludas nian Es-
peranto-hymnon.

286. Chodíte rád do biografu?
— Ĉu vi ŝatas viziti kine-
jon?

287. Vidím rád pěkné přírodní
snímky a týdenní kroniku.
— Mi ŝatas vidi belajn na-
turbildojn kaj semajnan
kronikon.

288. Dnes hraji dobrý ruský
film, ale, bohužel, vstu-
penky jsou již vyprodány.
— Hodiaŭ oni prezentas
bonan rusan filmon, sed,
bedaŭrinde, la biletoj es-
tas jam disvenditaj.

289. Kdy bude změna progra-
mu? — Kiam oni ŝanĝos
la programon?

290. Česká kinematografie se
rozhodně zmáhá. — La
ĉeĥa filmarto nepre prog-
resas.

291. Učila jsem se rytmice u
umělkyně N. — Mi lernis
ritmodancon ĉe la artisti-
no N.

292. Tančím rád - ne příliš -
náruživě. — Mi ŝatas danci
- ne multe - pasie.

293. Smím prosit? — Ĉu mi
povas peti (vin)?

294. Děkuji vám, jsem již vel-
mi unavena. — Dankon, mi
estas jam tre laca.

295. Mohu vás prosit o příští
tanec? — Ĉu mi povas
peti vin pri la venonta
danco?

296. Díky, ale jsem již zadána.
— Dankon, sed ĝi estas
jam rezervita.

297. To je opravdu škoda! —
Vera domaĝo!

LÁZNĚ. — BANEJO.

298. Kde jsou nejbližší veřejné
lázně? — Kie estas la plej
proksima publika banejo?

299. Kolik stojí vanová lázeň?
— Kiom kostas unu kuva
bano?

300. Tato koupel je pro mne
příliš studená. — Ĉi tiu
bano estas tro malvarma
por mi.

(Daŭrigota)

LA NOVA KULTURCENTRO DE LABORISTOJ EN JIHLAVA


(LA ENIREJO DE LA DOMO DE KULTURO)

Jan Hrdlička, sekretario de la Kulturdomo.
(Tradukis F. Tichý.)

La Kulturdomo de Revolucia Sindikata Movado (ROH) en Jihlava estis la 30-an de dec. 1961 solene inaŭgurita. Malfermo de la Kulturdomo fariĝis unu el la plej gravaj politikaj kaj kulturaj okazaĵoj en vivo de la laboristaro de Jihlava kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Vaste disvolviĝis la agado en sektoroj politike eduka kaj kleriga, kultura kaj socia. En sfero politike eduka kaj kleriga estos laborstrebado koncentrita al plua disvastigado kaj propagando de scienca mondkoncepto, al plialtigo de politikaj kaj fakaj scioj, al proprigo de progresemaj labormetodoj, al enkonduko de novaj tekniko kaj teknologio.

Agado de la Kulturdomo, la plej granda kultura instituto en la urbo, ekcelos grave kontribui al edukado de socialisma homo, influu la kulturan kaj socian vivon en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj tiel helpi al kontentigo de kulturbezonoj de la tuta loĝantaro pri finrealigo de la kultura revolucio. Plue agado de la Kulturdomo klopodos fariĝi centro por aktiva partopreno de laboristoj en disvolvigo de kultura vivo.

En la Kulturdomo estos vasta porinfana par-



to, kie laboros diversaj rondetoj, ekzemple: dramatika, marioneta, radioamatora, por modelistoj de aviadiloj kaj simile. Oni zorgos ankaŭ pri disvolviĝo de politeknika edukado de infanoj. En la porinfana parto estas moderne ekipita pupteatro por 140 rigardantoj, kie oni povos prezenti pup- kaj marionet-teatraĵojn.

En la Kulturdomo oni ankaŭ zorgos, ke la laboristoj en kadro de Popola Artkreado (LUT) mem kreu valorajn kulturprogramojn kaj ke disvastiĝu la membra bazo de la artgrupoj. Por tiu ĉi celo ĉiuj kondiĉoj estos preparitaj. En la Kulturdomo trovos lokon 17 klubejoj por plenkreskuloj, kie laboros grupoj kaj rondetoj de Popola Artkreado. En tiuj ĉi klubejoj oni kalkulas kun laborloko por plastikaj artoj (pentro-arto, skulpt-arto) kaj la fotoamatora rondeto kun laboratorio. Por celoj de la evoluo de tekniko kaj propagando de novaj progresemaj labormetodoj servos la produkt-teknika kabineto, kiu konsistas el lektora salono, kie estas eble projekcii mallarĝajn teknikajn filmojn, kaj pliaj studejoj.

Vastbaze oni laboros ĉi tie kun libro. En la Kulturdomo estas loko por librejo, enhavanta komence ĉirkaŭ 20 000 da volumoj, kaj por granda legejo. En ĉefa parto de la Kulturdomo estas teatra salono por 520 spektantoj, aranĝita samtempe por projekciado de larĝangulaj filmoj. En tiu ĉi salono okazos koncertoj de profesiaj kaj amatoraj muzik-ensembloj. Estos invitataj elstaraj muzikartistoj, solistoj de eminentaj oper-scenoj. Plue estas tie situata estrad-salonego por 800 rigardantoj, kiu servos por prezentado de kolektivaj de Popola Artkreado, de estrad-artistoj kaj ankaŭ por dancprogramoj. Salono por baletoj, kiu apartenas al ĉefa kultura parto, servos por ekzercoj de dancgrupoj kaj grupoj de ritmiko.

La laboristoj de nia urbo tiel ricevas por sia uzo belegan kulturan domon, kiu fariĝos bazo por ilia larĝa kaj riĉa kultura vivo kaj plene kontribuos al disvolvo de ilia artkreado.